

N. N. 51,

## Susuras jen la Hajtabua fjordo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Susuras jen la Hajtabua fjordo,  
Pri la vikingoj kantas kanton ĝi,  
Pri ŝipoj alportintaj al ĉi bordo  
Valorajn varojn el la sud', eĉ el Persi'!

Aŭdiĝas sonorilo  
Sonore tra l' trankvilo.  
Surakve fore sonas mevo-kri' –  
Ŝlesvigo, salutata estu vi!

*Traduko de la Germana poemo "Es rauscht die Schlei" de N. N. 51 en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2002-05.*

*MR-390-1 / Arg-791-1585 (2013-05-22 20:02:27)*